

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2011

# № 76

*Kara leganto, jen estas nia unua renkontiĝo post la jubilea 75-a numero kaj la unua printempa eldono de 2011. Ni havas esperplenajn kaj malĝojajn novaĵojn. Dum pli ol du monatoj malsanas post la operacio nia s-no Karlo Offutt. Li dankas al ĉiuj vizitintoj kaj telefonvokintoj, kiuj subtenis lin morale kaj fizike.*

*Fine de Februaro en nia urbo estis elektita nova (post 22 jaroj) urbestro Rahm Emanuel. Kvankam li enposteniĝos nur maje, la estraro de nia E-societo sendis al li gratul-leteron kaj dokumentaron (en la angla, kompreneble) pri E-o, UEA, Esperanto-USA kaj E-societo de Ŝikago. Ni esperu pri la favoraj kondiĉoj al IL en la Venta Urbo (hej-ho! aŭ hi-hi?).*

–La Redakcio

## “Traduko Ne Estas Metio, Traduko Estas Arto”

(profesia proverbo de tradukistoj)


Ekde sia fondo la Internacia Federacio de Tradukistoj festas la 30an de Septembro – tago de la Sankta Hieronimo (347-420) – kiel la Internacia Tago de Tradukistoj. Ĝi estas ankaŭ festo de E-istoj, ĉar ni ĉiuj estas eternaj tradukantoj.



Amerika Tradukista Asocio (ATA – American Translators Association), fondita en 1959, alvokas siajn membrojn digne celebri la

menciitan Tagon, okaze de ĉi dato eldon-giganto Hallmark ĉiu jare eldonas konvenajn poŝtkartojn kun slogano “Multaj lingvoj – unu profesio”. Kiu, do, estis Sankta Hieronimo (vd foton)? Li naskiĝis en urbeto Stridono (nuna Bosnio) tri centjaroj pli frue, ol kiam tien ĉi alvenis blankaj kroatoj de Ukrainio. Li estas konata per sia latina traduko de Biblio (el aramea-hebrea-helena lingvoj), kiun Rom-Katolika Eklezio uzas eĉ nun. “Ankorau de tempo de mia juneco mi tradukis ne vorton, sed ideon,” – diris en 404 St. Hieronimo – patrono de tradukistoj kaj bibliotekistoj.

„De tradukado disburĝoniĝis ĉiuj sciencoj” – tiun citaĵon de Giordano Bruno menciis Johano Florio (1603), samtempulo



de Ŝekspiro, la unua kompilisto de Ital-angla vortaro, tradukisto de “Dekameron” de Boccaccio en la anglan dum regno de Elizabeto la I-a. Sed la traduk-ideon persoj realigis pli frue – jam en VIII-X jc. en Jundiŝapur (Persujo) ekzistis skola institucio, kie la unuaj kristanoj parolis greke (helene), judoj – hebree kaj aramee, barataj scienculoj – sanskrite. Dum sia funkciado la institucio arabigis sennombrajn atingojn de tiutempa scienco kaj kulturo.

Transiru ni al la pli proksimaj tempoj. Tradukado havas multajn branĉojn, kiel medicina, jura (leĝa), scienca, teknika, literatura. Ankaŭ ATA unuigas pli ol 7000 tradukistojn de diversaj fakoj kaj en multaj lingvo-paroj. Sed hodiaŭ ni parolu pri literatura tradukarto. Post la II-a Mondmilito tradukologio estis formita kiel aparta branĉo de filologio kun interdisciplina karaktero. Tradukologio enhavas ne nur lingvistikajn, sed ankaŭ literaturologiajn aspektojn. Eĉ pli – tradukologio diferenciĝas de tiuj ĉi du branĉoj de filologio, do, ĝi havas sian apartan strukturon, siajn specifajn celojn kaj metodojn. Prof. V. Koptilov skribis pri la tradukebleco de iu ajn lingva teksto en iun ajn lingvon, ankaŭ – konservi en traduko rilaton inter parto kaj

### ANGLA

Madrid was hot in the summer. My apartment was stifling with the windows closed, and not much better when they were open. The annual exodus of mothers and children was in full swing, and the city felt comfortably empty in the absence of those who retreated from the heat to spend as long as they could in the mountains or on the coast. It was my favorite time of the year.

### TRADUKO

Madrido varmis somere. Mia loĝejo estis sufoka kun la fermitaj fenestroj, kaj la malfermo de ili ne multe helpis. La ĉiujara elirego de patrinoj kun infanoj estis je sia apogeo, kaj la urbo sentis sin komferte malplena pro la foresto de tiuj, kiuj retiriĝis de la varmego por pasigi kiom eble plej longan tempon en la montoj aŭ ĉe la marbordo. Por mi tio estis la plej ŝatata tempo de jaro.

entuto similan al la originalo, t.e. – rilaton inter subjektiva kaj objektiva. Tiel estis enkondukita metodiko de tradukologia analizo, kiu postulas de tradukistoj la taskon: konsideri artan (subjektivan) kaj sciencan (objektivan) aspektojn de traduko kun nepra komparado de traduko kaj originalo.

Nun – praktiko. Dekomence por la majstro-klaso estis elektitaj du E-tradukoj de poemo Kaŭkazo de renoma ukraina poeto kaj pentristo T. Ševčenko. La poeton multaj konas, sed ne multaj povas analizi E-elukrainigaĵon. Pro tio, hazarde kaj feliĉe, estis elektita rakonto kun ege taŭga titolo “Arto en Traduko” de T. Beckwith, aperinta en la januara n-ro de “The ATA Chronicle”. La anglalingva teksto estis dividita en 6 partojn kaj ĉiu parto estis sendita al 2 sendependaj tradukontoj. Dum la kunsido de nia E-societo ni analizis diversajn E-tradukojn, komparante ilin kun la angla originalo (komparu mem la komencon).

Ni ne vane laboris: la aŭtoro donis al ni eldonrajton kaj la ret-revuo de la E-societo de Kebekio (Kanado) “La Riverego” aperigos ĝin en sia sekvanta numero. Dankon al ĉiuj.  
–Araneo

## George Soros kaj Esperanto



Nekutime grandan publikan atenton ricevis la ĉi-jara simpozio de la Novjorka oficejo de UEA, kiun ĉeestis la mondfama miliardulo George Soros (meze sur la foto de UEA). Unu el la programeroj dum la simpozio estis prezento de angla traduko de la verko “Modernaj Robinzonoj”, verkita en Esperanto de la patro de George Soros, kaj unue aperinta en la jaro 1923. Dum la simpozio montriĝis, ke George Soros mem junaĝe parkeris poemon de Zamenhof, informis *Libera folio*.

## El Nia Leterkesto

El Lucerno mi multe dankas vin pro la februara Shikaga Bulteno. Tre interesa artikolo pri la bahaa kredo, kiun mi antaŭensendas al bahaa Esperantistino en Lucerno.

Bedaurinde mi devas hodiaŭ informi vin, ke la Lucerna Esperanto-Societo malfondighis fine de decembro 2010 pro manko de aktivuloj. Mi bedauras tiun malgajigan informon, sed la tajdo nuntempe ne fluas en la direkto de Esperanto, kiel vi certe ankaŭ rimarkas. La iama entuziasmo mortas kun la maljunuloj. Estas lasite al la kelkaj restantaj unuopulo en Lucerno antaŭenporti la flamon pri la grandioza verko de L.L. Zamenhof ghis ankaŭ tiu estingighos kun la malapero de la portantoj. Restas la espero ke ghi iam reekflamu.

Mi dankas vin pro la longdaŭra regula alsendo de la Shikaga Bulteno kaj deziras al ghi kaj al la Esperanto Societo de Shikago daŭran sukceson kaj bonfarton. Kun samideanaj kaj afablaj salutoj, nome de la iama Lucerna Esperanto-Societo.  
–Sonja Brun

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Marto – Bill Mania prezentos  
“Kio estas Esperanto?”

26an de Aprilo – Bill Mania:  
“Vankuvero”

24an de Majo – Prelegos Marc Shafroth

26an de Junio – Tradicia Pikniko